

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

NIA FESTO

BRILA BILLANCO

EKONOMIA
E-AGADO

SEN MORTAJ
KONTRAŬFAŝISTOJ

UNUAJ SUR
BULGARA TERO

LEGENDOJ PRI
PARTIZANOJ

100 JAROJN
ESPERANTO

BELETRO KAJ POEZIO

NI RECENZAS

ENLANDA MOVADO

SUPROJ DE LA
BULGARA SPORTO



JARO 53 • N-RO 9 • SEPTEMBRO • 84

BULGARIO



Mi ne scias, kio estas vi:
tero, panjo, amatin' plenfida,
digna kiel la montar' Pirin'
aŭ Marica brua kaj senbrida.

Mi koleras, plena de angor',
por forgesi — ne plu restis forto,
pri Siŝman', pri lia sanga plor',
pri la blinda Samuila sorto.

Estas vi por la poeto man'
eta, sed tutpreta por ĵurvorto,
kaj por Levski — flirta flaga flam',
kaj por Botev — brava vira morto.

Restis viva vi, ĉar gardis vin
Baba Tonka, Rajna kaj Veneta,
kaj — en tiu sklava land' aglin',
kaj rikoltistin' sur kampo eta.

Tondro en la land' ruladis for
kaj ekkantis kuglo en embuskoj.
Mutis vi en dolĉa kordolor'
kaj ĝojploris: „Zdravstvujte, bratuŝki!“

Sed atingis ŝtorm' survoje vin,
furiozis plagoj kaj bataloj,
korvoj bekis vin sen hont', sen fin',
ĉirkaŭmordis lupoj kaj ŝakaloj.

Lipojn premas mi, suferas plej,
por forgesi — ne plu restis forto,
pri la pendumil' de Pop' Andrej,
pri l'viktimoj kun senspura morto.

Ne subiĝis vi! Ne falis man'
antaŭ skurĝ' de fremdaj kaj de viaj.
Kaj protektis la montar' Balkan'
partizanojn en arbaroj siaj.

Brulis via karn'... sed estis vi
Vela, kaj Jordanka, kaj Liljana.
Oni ĉe Balvan' mortigas vin, —
vivas vi en Orlova Poljana.

Ree ŝultrojn arbajn skuis vent',
kaj Danubo ridis, larme festis.
Ree mutis vi kun dolĉa sent'
kriis: „Zdravstvujte, družja sovetŝki!“

Nun vi floras... Helas mia tag',
ĉiam kunligita kun la via.
Kaj mi sentas vin per mia sang'
tero, panjo kaj amata mia.

Tradukis: ASEN GRIGOROV





BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53
SEPTEMBRO
9 • 1984

NIA FESTO



Antaŭ kvardek jaroj la ribelintaj eŭropaj popoloj, inspirataj de la venkoj de la Soveta Armeo, detruadis la lastajn bastionojn de Hitler.

Je la Naŭa de Septembro 1944 ribelis ankaŭ la bulgara popolo, bonvenigante per floroj kaj brakumoj la bravajn sovetajn soldatojn.

De la montoj Rodopi, Rila, Pirin, Sredna Gora kaj Balkano revenis en urbojn kaj vilaĝojn la partizanoj kaj renversis la sangan monarkion.

Jubilis la popolo. Ploris virinoj — iuj pro feliĉo, aliaj — ĉar perdis en la batalo edzojn kaj gefilojn.

Tamen la homaj viktimoj ne estis sencelaj. Jam neniu plu baris la vojon al socialisma socio — revo de la pereintaj kamaradoj kaj iliaj kunbatalantoj.

La Partio de bulgaraj komunistoj, kiu preparis kaj gvidis la socialisman revolucion, sub la direktado kaj inspirado de Georgi Dimitrov, alpaŝis al konstruado de la nova vivo. La uzinoj estiĝis posedaĵo de la popola ŝtato, la kampara-

noj alpaŝis al kolektivaj labormetodoj, estis faritaj paŝoj al socialisma kulturo.

Irante laŭ nespertitaj vojoj, ne ĉio estis sen-erara. Sed la Partio rimarkis la devojiĝojn kaj per la decidoj de Aprilo 1956 montris la ĝustan vojon. Sekvante la direktivojn de la sperta partia stabo frunte kun kamarado Todor Jivkov, nia lando per sepmejlaj paŝoj iras laŭ la destinita vojo kaj konstruas maturan socialisman socion, admirate de la cetera mondo. Modernaj uzinoj, elektraj centraloj, meĥanizitaj agrokompleksoj, novaj urboj kaj kvartaloj, novaj lernejoj kaj universitatoj, ripozdomoj kaj kulturdomoj — jen la rezultoj de la socialisma konstruado.

Nun nia popolo renkontas la kvardekjaran datrevenon de la socialisma revolucio forte unuigita ĉirkaŭ la Partio, kun novaj sukcesoj en ĉiuj sektoroj de la ekonomia kaj kultura konstruado.

Antaŭ kvardek jaroj nia popolo kontribuis al la batalo kontraŭ faŝismo. Nun ĝi kontribuas al la batalo kontraŭ la preparata de la imperiistoj nova mondmilito, kiu certe transformiĝos en nuklean katastrofon por la tuta homaro. En tiu batalo partoprenas ankaŭ ni, bulgaraj esperantistoj.

La festo de nia popolo estas festo ankaŭ de la bulgaraj esperantistoj, ĉar en ĉiuj konkeraĵoj de nia lando ili havas sian modestan meriton

BRILA BILANCO

Sur la tempesta kaj malglata vojo de sia 13-jarcenta ekzistado nia popolo kun kontenteco notas la apartan signifon de la periodo post la 9-a de septembro 1944 — post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario.

En tiu tago antaŭ kvar jardekoj la ribelinta bulgara popolo, per la helpo de la heroo Soveta Liberiga Armeo por ĉiam forĵetis de si siaj ŝultroj la regpovon de la kapitalo kaj faŝismo. Je la kosto de nemezureblaj mankoj, suferoj kaj karaj homaj viktimoj la popolo estiĝis mastro de sia propra sorto. Sub la gvido de la heroo Bulgara Komunista Partio, unuigite en la tutnacia Patrolanda Fronto, ĝi firme, kun fido pri la estonto ekiris laŭ la vojo de socialisma paca kreado, laŭ la vojo de la nova vivo.

Pasis kvar jardekoj post tiu signifplena tago. Kaj Bulgario, kiu en la pasinteco estis postrestinta agrara ŝtato kun malmulte evoluinta industrio kaj okupis iun el la lastaj lokoj en la ekonomia, socia kaj kultura statistiko de Eŭropo, nun estas nereconebla — alte evoluinta industria ŝtato kun moderna agrikulturo.

La trapasita vojo estis vojo de batalo por intensa evoluo de la ekonomio surbaze de plana gvidado, de firma unueco kaj frata kunlaborado kun USSR kaj la ceteraj socialismaj landoj — membroj de la Konsilio de Ekonomia Interhelpo (KEI).

Hodiaŭ la aspekton de nuntempa socialisma Bulgario difinas miloj da modernaj uzinoj, kombinatoj kaj grandaj modernaj agrikulturaj mastrumoj. Plej konkretan kaj klaran, plej plenan imagon pri la grandega antaŭensalto, kiun faris nia lando dum tiuj kvar jardekoj oni povas ricevi de la komparoj, de la bilanco pri la farita laboro. La fondkapitaloj, kiuj estas la materiala bazo de la produktado, kreskis de 32,9 miliardoj da levoj en 1970 al 94,3 miliardoj da levoj en 1983. Tio signifas, ke nur dum la lastaj 14 jaroj estas kreita la materiala bazo de du novaj Bulgarioj.

Per ekskluzive akcelita ritmo kreskis ankaŭ la socia produkto — de 26,2 miliardoj da levoj en 1970 al 68,9 miliardoj da levoj en 1983. En la sama jaro la socia produkto meze pokape de la loĝantaro estis proksimume 60-oble pli granda kompare kun 1939.

Surbaze de la moderna industrio kaj agrikulturo kreskis ankaŭ la nacia enspezo. En 1983 ĝi estis 23,5 miliardoj da levoj, aŭ 13-oble pli granda ol tiu de antaŭmilita Bulgario en 1939.

En la pasinteco Bulgario eĉ ne povis revii pri nigra kaj kolora metalurgio. Tiu sama lando, kiu iam importis ĉiujn necesajn maŝinojn, eĉ kudrilojn, nun produktas 3 milionojn da tunoj da ŝtalo, pli ol 1,7 milionojn da tunoj da gisfero, pli ol 3,3 milionojn da tunoj da laminatita fero.

Kapitalisma Bulgario produktis 266 milionojn da kilovathoroj da elektroenergio po jare. La elektro estis lukso, disponebla nur en la grandaj urboj. Nun nia lando produktas 42,6 miliardojn da kilovathoroj da elektroenergio, do laŭ produktokvanto kaj konsumado ĝi antaŭis ne nur la najbarajn landojn, sed ankaŭ vicon da ŝtatoj en Eŭropo kaj en la mondo.

Popola Respubliko Bulgario estas alte evoluinta maŝinkonstrua lando, unu el la plej grandaj produktantoj de elektro- kaj motorĉaroj, de ŝipoj por mara navigado, de akvopumiloj, agrikulturaj maŝinoj, metaltranĉaj maŝinoj kun cifera programa direktado, de peza investa maŝinkonstruado kaj de industriaj robotoj. Elokventa estas la fakto, ke nun Bulgario kontentigas 50% de la bezonoj de la socialismaj landoj pri produktaĵoj de la elektrotekniko.

Dum la jaroj de popola regado alte evoluis vico da gravaj industribranĉoj — kemia, konstrua, nutraĵa k. a.

Profundaj ŝanĝoj okazis ankaŭ en la agrikulturo. Malriĉa kaj dispecigita en milionojn da agroj en la pasinteco, uzanta primitivajn laborilojn, hodiaŭ ĝi estas alte mehanizita, grandigita, intensa agrikulturo, ofte prezentata kiel modela en multaj landoj de la mondo.

La bulgaraj oleodona rozo, tabako, fruktoj kaj legomoj, konservajoj kaj vinoj ĝuas merititan famon ekster la limoj de nia lando.

La naturbelaĵoj de Bulgario — ĝiaj maraj, montaraj kaj bankuracaj ripozlokoj ĉiujare altiras milionojn da turistoj el ĉiuj mondpartoj.

Surbaze de tiu stabila ekonomia potencialo kaj dank' al la laboremo de nia popolo, dank' al la kunlaborado kun Sovet-unio kaj la ceteraj socialismaj landoj, nun Bulgario estas estimata kaj serĉata partnero en la internacia ko-

merco. Ĝi komercas kun 113 landoj en la mondo kaj laŭ varinterŝanĝo pokape de la loĝantaro okupas lokon inter la unuaj 12 landoj en la mondo.

La grandegaj ekonomiaj sukcesoj, atingitaj dum tiuj kvar jardekoj sub la saĝa gvidado de la Bulgara Komunista Partio kaj ĝia unua gvidanto Todor Ĵivkov estas la solida bazo por prosperado en la sfero de socialaj zorgoj kaj sur la kultura fronto. Senĉese kreskas la realaj enspezoj de la loĝantaro. Pligrandigas la socialaj fondusoj por konsumado — grandega loĝejkonstruado, senpaga instruado kaj kuracado, zorgoj pri la socia asekurado, kulturo ktp. Malgraŭ la komplika kaj streĉita situacio en la nuntempa mondo, malgraŭ la krizo pri energio kaj krudaĵoj, Bulgario havas stabilan eko-

nomion kaj dank' al tio ĝi povas garantii stabilan socialan kaj kulturen evoluon de sia loĝantaro.

Kvar jardekoj de socialisma konstruado — jen estas ekzemplo pri tio, kion povas atingi popolo libera de ekspluatado kaj subpremado, popolo, kiu vivas kaj laboras en paco. Ĉu estas alia pli brila pruvo pri la vivipovo de regpotenco, pri defendo de la popolaj rajtoj kaj liberecoj ol tio, kio estas reale farita per materiala, sociala kaj kultura prospero de la popolo?

Kun komprenebla fiero la bulgaraj esperantistoj notas tiun ĝojigan optimismen bilancon, ĉar en ĝi estas parteto ankaŭ de iliaj laboro, lerteco kaj talentoj, de ilia kredo kaj batalo por paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

HAIM LEVI

EKONOMIA E-AGADO

La rajto, jursence, estas la donita de la juro eblo konduiti iamaniere.

La rajto pri proprieto (mallonge: proprieto) estas speco de rajto. La donita de la proprieto eblo rilatas al posedo, uzo kaj dispono pri materialaj objektoj.

La bulgara juro kreas diversajn proprietojn.

La plej grava, la dominanta proprieto, estas la ŝtata. Tio memkompreneblas, ĉar Bulgario estas socialisma ŝtato.

Krom la ŝtato, proprietuloj povas esti diversaj neŝtataj organizacioj kaj, nature, la civitanoj.

Inter la diversaj neŝtataj organizacioj troviĝas ankaŭ la Bulgara Esperantista Asocio. Fakte, la Bulgara Esperantista Asocio estas aro da proprietuloj. Laŭ § 36 de la Statuto de BEA, kiel la Asocio en sia kompleta formo, tiel ankaŭ la sekcioj, distriktoj, la komunumaj organizaĵoj kaj ankaŭ ĉiuj E-societoj estas memstaraj unuoj kun rajtoj kaj devoj. El tio sekvas, ke ili povas akiri ĉiuspecajn havaĵrajtojn, inkluzive proprigi al si terenojn kaj konstruaĵojn.

Lastatempe, al tiu ĉi aro da proprietuloj aldoniĝis nova, eksterordinare grava por la bulgara esperantista movado aro da proprietuloj. Laŭ Dekreto de la Ministraro (n-ro 104 de la

4-a de julio 1984) la Bulgara Esperantista Asocio ricevas la rajton produkti kaj vendi al la loĝantaro certajn varojn, kiel ankaŭ efektivigi diversajn servojn. Tiucele, per la sama Dekreto la Bulgara Esperantista Asocio estas rajtigita fondi koncernan ekonomian organizacion. Tiu ĉi organizacio estas jam fondita kaj funkcias. Ĝi konsistas el centra instanco sub la nomo Ĉefa Ekonomia Direkcio „Globus“ — Sofio, kun filioj en la lando, organizitaj en la formo de entreprenoj kun diversaj nomoj. Nome Direkcio „Globus“ kaj ties filioj estas la novaj proprietuloj en la sistemo de la Bulgara Esperantista Asocio.

La Dekreto de 4-a de julio 1984 havas gravan signifon por la Bulgara Esperantista Asocio kaj entute por la bulgara Esperantomovado ĝenerale. Tiu ĉi Dekreto garantias solidan materialan bazon de la bulgara Esperantomovado. Per la profito el la ekonomia agado ne nur estos vivtenata la aparato de BEA kaj subvenciata la Esperanto-propagando, sed, espereble, estos realigita la jam delonge fleĝata ideo pri konstruo de nova grandioza Esperanto-domo en Sofio, kiu estos fieraĵo ne nur por la bulgara, sed ankaŭ por la tutmonda esperantistaro.

LJUBOMIR MIHAJLOV



ONI NENIAM FORGESOS ŜIN



Mara Taseva naskiĝis la 13-an de septembro 1900 en familio de fervojisto, kiu loĝis en la kantondomo apud v. Nevski, oriente de Popovo.

Ankoraŭ en sia infana aĝo ŝi ekspertis la mizeron kaj la batojn de la sorto. Peza estis la vivo en la multnombra familio — Mara estis la plej aĝa inter sep infanoj kaj ŝi devis tre frue komenci labori por helpi la gepatrojn.

Tial ŝi finis nur bazan lernejon kaj poste komencis labori ĉe la kudristino avino Stefana Genĉeva. Dum la vintro ŝi laboris en tabaktenejo. Apenaŭ 19-jara ŝi restis duonorfino — mortis ŝia patro kaj ŝiaj zorgoj pri la familio plimultiĝis.

Mara estis edukita en progresemoj ideoj. Sia patro estis aktiva sindikata aganto — kaskisto de la sekcio de fervojistoj. Li ricevis kaj dissendadis socialisman literaturon. Pro partopreno en la striko de fervojistoj oni turmentis lin kruele.

En la jaroj post la Unua Mondmilito en Bulgario kaj en la tuta mondo okazis eventoj, kiuj minacis la kapitalisman socion kaj samtempe montris al la popoloj la vojon al batalo por neniigo de tiu socio kaj por starigo de popola potenco. Tiuj eventoj efikis sur la junan Mara por naskiĝo de revoluciaj ideoj en ŝia konscio. Ŝi partoprenis la preparon de la Septembra Ribelo. En 1926 ŝi loĝis en Varna kaj laboris en la teksfabriko „Car Boris“ (nun „Hr. Botev“). Ŝi aktive partoprenis la batalon por plialtigo de la laboristaj salajroj kaj vivkondiĉoj. Tie ŝi eniris en la vicojn de la novefondita Bulgara Laborista Partio.

En 1935 en la fabriko estis malkovrita nelegala partia grupo. Oni trovis en la loĝejo de Mara Taseva propagandajn afiŝojn kaj ŝi estis arestita.

Dum la juĝsploro ŝi kondukis digne kaj kuraĝe kaj neniun denuncis.

Foje en la ĉelon de la arestitoj eniris agento kaj komencis bati Valjan Viĉeva. Mara tuj eksaltis kiel pikita, forpuŝis lin flanken kaj defendis sian pli junan amikinson per sia korpo, akceptante sur sin la batojn.

La verdikto de Mara estis malliberigo dum tri jaroj kaj aparte monpuno. En la malliberejo Mara estis elektita en la estraro de la virina fako. Ŝi aktive partoprenis marksismajn rondojn kaj la aperigon de ĵurnalo „Rabotniĉeska Tribuna“ („Laborista Tribuno“).

Rada Todorova, kiu tiutempe ankaŭ estis en la malliberejo, rakontas kiel nur dum unu nokto Mara maltrikis sian puloveron kaj triakis alian puloveron por la kondamnita al morto Jordan Ljutibrodski — por ke li estu pura kaj bela ĉe la plenumo de la verdikto.

Post tri jaroj Mara estis liberigita, sed en Varna ŝi ne povis plu trovi laboron — ĉiuj pordoj estis fermitaj por ŝi, tial ŝi revenis en Popovo ĉe sia familio, sed tie oni denove arestis ŝin pro la monpuno, kiun ŝi ne povis pagi, kaj sendis ŝin en la malliberejon de Sumen por ankoraŭ 6 monatoj. En 1938 ŝi denove estis libera, helpis sian patrinon, laboris po kelkaj monatoj diversloke — kiel flegistino en la privata malsanulejo de la kuracisto Belĉo Donĉev, en la fabriko por ceramikaĵoj k. a. Tiutempe ŝi konatiĝis kun Marin Alabaŝev el v. Svetlen, kiu havigis al ŝi lernolibron de Esperanto. Mara estis ravita de la lingvo, de ĝiaj facileco kaj taŭgeco, de la ideo pri paco kaj amikeco inter la popoloj. Ŝi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte.

Tiutempe la partian organizaĵon en Popovo trafis peza frapo — la sekretario Petko Marinov estis mortigita kaj la organizaĵo stagnis. Tiam Mara iniciatis nelegalan kunvenon de komunistoj en aprilo 1939. La regiona estraro de BKP estis restarigita kaj Mara estis elektita kiel ĝia sekretario.

En julio 1940 ŝi estis denove arestita kaj tutan semajnon kruele batita. La policanoj ricevis neniajn informojn de ŝi kaj denove liberigis ŝin pro manko de pruvoj.

En majo 1942 la policanoj denove arestas dekojn da progresemaj gejunuloj. Mara ne sukcesis kaŝi sin kaj estis arestita kune kun aliaj 58 komunistoj. Ŝi estis la sola virino inter ili. En aŭgusto ŝi ekstaris antaŭ la militista tribunalo. La eldiron de la verdikto —

morto per pendumo, ŝi renkontis kun fiere levita kapo. La 14-an de aŭgusto oni ekkondukis ŝin al la pendumilo. Mara sentime alpaŝis kaj mem metis la maŝon sur sian kolon kun la vortoj: „Mi mortas, sed miaj gekamaradoj daŭrigos la batalon, ili venĝos por mi kaj nia afero venkos. . .“

Tiel en Bulgario en 1942 estis plenumita la unua mortkondamno kontraŭ virino, kontraŭ la esperantistino Mara Taseva. Postmorte nia popola ŝtato distingis ŝin per ordeno „Por popola libero“. Ekde 1964 la domo, en kiu loĝis Mara, estas restaŭrita kaj transformita en muzeon.

DIMITAR GANEV

KURACISTO-PARTIZANO

(D-RO VÂRBAN RUSINOV GENĈEV)

D-ro Vârban Genĉev estas naskita la 26-an de julio 1918 en vilaĝo Ĉakali, distrikto de Gabrovo. Ekde sia infanaĝo li estas edukita labori kaj ne havas multan tempon por ludoj kaj petoloj. Aŭtune de 1925 li estiĝas lernanto. Liaj unuaj instruistoj estas la junaj progresemaj instruistoj-komunistoj Gagarov kaj Grudi Atanasov.

En la lernejo Vârban estas bonega lernanto. Li partoprenas la lernejan amatoran art-grupon, kun granda emo legas belartan literaturon.

En 1932 Vârban estas lernanto en la gimnazio de Târnovo. Sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio en la gimnazio estas fondita Laborista Junulara Unuiĝo. Vârban estiĝas ĝia aktiva membro kaj en la lasta klaso — ĝia sekretario. Ankaŭ en la gimnazio li estas bonega lernanto. Kun junula ardo kaj entuziasmo, kun profunda konvinkiteco li preparas referaĵojn, diskutas dum kunvenoj. Li scipovas gajni siajn samlernantojn por la progresemaj ideoj kaj altiras multajn lernantojn al la Laborista Junulara Unuiĝo kaj al la esperantista kaj abstinencula societoj.

Vârban Genĉev estas aktiva esperantisto. Ekde la unua gimnazia klaso li lernas Esperanton. Dum la sekvontaj jaroj li perfektigas kaj gvidas kursojn.

Vârban komencas korespondi kun esperantistoj el aliaj landoj. Li estas fronte de la gimnazia esperantista societo „Flamo“, partoprenas aktive en la preparo kaj okazigo de la 23-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Târnovo, urbo konsiderata tiam kiel lulilo de la bulgaraj esperantistoj.

Vârban estas en la centro de aktivado de la E-societo en la gimnazio, kiu entute estas sub influo de la Laborista Junulara Unuiĝo. La

kvin gimnaziaj jaroj estas por li jaroj de aktiva revolucia agado. Li aliĝas al la Komunista Partio kaj ne perfidas ĝin ĝis la fino de sia vivo. En septembro 1937 li estas studento en la medicina fakultato en Sofio. La Bulgara Popola Studenta Unuiĝo (BONNS) tuj akceptas Vârban Genĉev en siajn vicojn.

La 22-an de junio 1941 Germanio atakas militite Sovetunion. Ekestas malfacila tempo ankaŭ por la bulgara popolo. La Bulgara Komunista Partio tuj akceptas kurson al armita batalo. Komenciĝas la partizana batalo, organizitaj estas la unuaj manifestaĵoj de batalgrupoj.

En junio 1942 Vârban brile finas siajn studojn de medicino. Sed pro lia revolucia kontraŭfaŝisma aktivado li estas foreste kondamnita al morto. En marto 1943 li aliĝas al la partizantaĉmento sub la nomo Stojan kaj aktive partoprenas en la bataloj de la taĉmento kontraŭ la bulgaraj faŝistoj.

La Bulgara Komunista Partio ĝuste priaksas la kvalitojn de d-ro Vârban Genĉev — li estiĝas politikomisaro de la partizana taĉmento de Gorna Orjaĥovica. Li montriĝas sperta politika gvidanto, ĉiam estas en la unuaj vicoj kaj per sia sinteno li estas ekzemplo por la partizanoj.

La kruela batalo daŭras plu. La 30-an de marto 1944 en malegala batalo kun multnombra malamiko li estas grave vundita. Por ne fali viva en la manojn de la policanoj, li pafmortigas sin.

Pereas heroe flama komunisto, brava partizano, la politikomisaro de la taĉmento de Gorna Orjaĥovica, la aktiva esperantisto d-ro Vârban Genĉev.

D-ro CVETANA STAMENOVA

UNUAJ SUR BULGARA TERO

Mi estas filino de germanaj komunistoj, naskita en 1924. Mia familio estas Podimaĥina, sed antaŭ la edziĝo — Bernstein. Mia patro Rudolph Bernstein en 1933 kune kun du aliaj germanaj komunistoj estis atestanto de la sindefendo de Georgi Dimitrov, Blagoj Popov kaj Vasil Tanev en la proceso pri bruligo de la Rajhstago. Ĝis nun li subtenas intimajn kontaktojn kun la ambasadorejo de Popola Respubliko Bulgario en nia lando kaj kun la Muzeo de Georgi Dimitrov en Lejpcigo.

En 1934 kune kun miaj gepatroj mi elmigris en Sovet-Union, en Moskvon. Fininte la mezlernejon en 1942, mi iris al la fronto kiel volontulino kaj pasigis la tutan militon en la vicoj de la Soveta Armeo, kun kiu mi atingis ĝis Vieno. En 1944, post kiam Tria Ukraina Fronto pasis tra Rumanio, niaj armetrupoj atingis la bulgaran landlimon. Laŭ ordono de la Politika Gvidantaro de Tria Ukraina Fronto, la unuaj, kaj tiam ankaŭ ununuraj, kiuj transpasis la bulgaran landlimon, estis ni kvar sovetaj armeanoj — skipo de la potenca altparolila instalaĵo (MGU). Ĉefo de la instalaĵo estis kapitano Evgenij Petroviĉ Godin el Kievo, mi — parolisto-tradukisto, ĉefleŭtenanto, ŝoforo — la soldato Ivan Kuzmiĉ Fomenko el Krasnovodsk kaj unu politika kunlaboranto el la stabo, majoro, kies familion mi ne memoras.

Nia tasko estis organizi elsendojn en la loĝlokoj laŭ la vojo al Sofio, kies celo estis prepari la loĝantaron por la antaŭstaranta eni-

ro en la landon de la Soveta Armeo, kiu devis transpasi Bulgarion survoje al Jugoslavio, Hungario kaj Aŭstrio. Oni ĉie afable akceptis nin. Ni prezentis koncertojn per gramofondiskoj, senpere interparolis kun la loĝantaro. Per la laŭtparolila instalaĵo eldirojn faris ankaŭ bulgaraj komunistoj — „aktivuloj de la unua horo“, kiel oni diras ĉe ni. Tiel ni pasis tra multaj loĝlokoj, inter ili ankaŭ Veliko Tŕrnovo, kaj la fino de nia marŝo estis Sofio. Komence en Sofio ni loĝis en la domo de jam ne tre juna, liberigita el la prizono bulgara komunisto, kaj pli poste nin ĉiujn oni instalas en la vilao de fuĝinta fabrikanto, kies familia nomo, se mi bone memoras, estis Ĉapraŝikov. Elsendojn per nia altparolanta instalaĵo ni organizis ankaŭ en Sofio. Tiel ni laboris ĝis la alveno de la Soveta Armeo. En Sofio al ni aliĝis juna bulgara ŝoforo nomata Minko, kun la leĝera aŭto de sia fuĝinta riĉa mastro. Li veturigis nin ĝis la jugoslavia landlimo mem. Ni kun bedaŭro disiĝis kun li.

Jen estas ĉio, kion mi povas rakonti pri mia restado en Bulgario en la aŭtuno de 1944.

Post la milito mi edziniĝis. Mia familinomo nun estas Podimaĥina, mi havas du grandaĝajn filinojn kaj kvinjaran nepinon. En Sovetunio mi loĝis kun mia familio ĝis 1960, post kio mi revenis en mian patrolandon — la Germanan Demokratian Respublikon.

Hanna Rudolfovna PODIMAĤINA,
GDR, 102, Molstrasse, 7, Berlino

FIDELA HELPANTO DE LA PARTIO

En 1931, rezulte de la nova revolucia leviĝo kaj laŭ modelo el aliaj landoj, ĉe ni estas fondita Laborista Esperantista Asocio (LEA). En la komenco de la 30-aj jaroj ĝi plenumas grandegan laŭ sia skalo laboron por la marksisma-leninisma edukado de la esperantistoj kaj por konigo al la laborista klaso en alilando de la bataloj en nia lando. Post la 19-maja ŝtatrenverso en 1934 la ekzistado de LEA kaj de la ceteraj amasorganizoj, gvidataj de BKP, estas malpermesita. Ĝiaj sekcioj tamen plu ekzistas nelegale kaj starigas sin je dispono de la koncernaj partiaj komitatoj. Pro la pezaj kondiĉoj de laboro la rekta ligo inter ties membroj estis malfacile realigebla. Por ebligi la gvidadon de la laboristoj-esperantistoj, multloke en la lando komencas aperi gazetoj kaj bultenoj en Esperanto, kiuj donis instrukciojn kiel agi ĉe la nova

situacio. Inter ili plej grava estas la nelegala gazeto „Sturmulo“. Ĝi komencas aperi stencile en Plovdiv aŭtune de 1934, laŭ decido de la II militkonferenco de LEA, okazinta en aŭgusto de la sama jaro apud vilaĝo Kuklen. Redaktoro de la gazeto estas Ĥristo Gorov, membro de CK de LEA kaj kunlaborantoj — Todor Sofroniev, Nikola Stefanov, Stojan Todorov, Stefan Georgiev kaj Kostadin Ĉiĉanov. La eldonbazo portis la nomon de Mitko Surlev. Por funkciigi la stencilaparaton — nova tekniko tiutempe, Kostadin Ĉiĉanov skribas al sia korespondanto en Japanio, kiu sendas al li desegnaĵojn kaj klarigas la principojn de laboro kun tiu aparato. La gazeto komencas aperi kaj ĉiu numero havas po kelkajn paĝojn. Ĝia plej grava funkcio estas la organiza, Ĝi alvokas la esperantistojn aliĝi al la batalo kontraŭ persekutoj de komunistoj kaj aliaj

progresemaĵoj homoj, direktas la agadon de la E-grupoj, orientas ĝin al koordinado kun tiu de la ceteraj amasaj organizaĵoj, kiuj estas sub influo de la Partio. En ĝia enhavo videbligas nova momento, heroldo de la nova kurso de la Partio post la VII kongreso de la Komunista Internacio. Sin bazante sur la sperto de la laboristoj-esperantistoj el aliaj landoj kaj konsiderante la pezajn kondiĉojn ĉe ni en la momento, la gazeto direktas la laboristojn-esperantistojn al laboro en la politike neŭtralaj E-societoj, por ke ili estigu legala formo por agado de la Partio. Ĝi alvokas la esperantistojn skribi al siaj alilandaj korespondantoj pri la teroro, kies viktimoj estigas la progresemaĵoj homoj, kaj instigi ilin sendi protestojn al la registaro; instrukas ilin kiel organizi sian korespondadon kun Sovet-Unio per perantoj el la okcidentaj landoj. La gazeto apartigas lokon al materialoj lige kun datrevenoj de revoluciaj eventoj. En ĝi aperas recenzoj, bibliografiaj notoj, sciigoj, opinioj de legantoj k. a. Per speciala artikolo ĝi notas la datrevenon de liberigo de Georgi Dimitrov fare de la faŝistoj kaj alvokas ĉiujn revoluciulojn firme kaj virece sin teni antaŭ la malamiko. En ĉiu sinsekva numero la ĉefa temo — neceso pri stabila organizaĵo de la progresemaĵoj esperantistoj, por ke ili estu en servo de BKP, estas plu traktata en la literaturaj materialoj. Preskaŭ en ĉiu numero oni publikigas ankaŭ versaĵojn kun revolucia enhavo. De gazeto „Sturmulo“ aperas entute 14 numeroj. Ĝi estas disvastigata en la distriktoj de Plovdiv, Stara

Zagora kaj Haskovo kaj en iuj urboj de Suda Bulgario. Konsiderinda parto de ties eldonkvanto estis sendata al redakcioj, kolektivoj kaj privataj personoj en alilando — Svedio, Japanio, Ĉinio, Francio, kaj konigis al la monda E-publiko la klasbatalojn ĉe ni. Sovet-Unio ĝi atingis dank' al peranto el Francio. Pri ĝia ekspedado zorgis Kostadin Ĉiĉanov kaj Mara Harizanova.

En mallonga periodo la nelegala gazeto „Sturmulo“ gajnas vastan aŭditorion inter la esperantistoj ĉe ni kaj en alilando. Kiam en majo 1935 la polico malkovras kaj arestas ĝiajn eldonantojn, ĝi ĉesas aperi. La engaĝitaj pri ĝia eldonado esperantistoj estas kondamnitaj al diversaj templimoj de malliberigo.

La apero kaj disvastigado de gazeto „Sturmulo“ koincidas kun grava historia momento, kiam sin trudis la bezono ŝanĝi la metodojn de batalo. Al la gazeto estas konfiditaj gravaj taskoj. Pere de ĝi la partia vero atingas la esperantistojn en nia lando kaj en eksterlando. Ĝi havas ne nur regionan, sed ankaŭ nacian signifon. Kiel lasta reprezentanto de la revolucia E-jurnalismo el la periodo de la 30-aj jaroj, ĝi kunportas ne nur la ideojn de iu forpasinta historia etapo el la evoluo de la klasbatalo, sed ankaŭ novajn ideojn, kiuj floris en la laboro de BKP kun la amasorganizaĵoj en la antaŭvespero de la socialisma revolucio en Bulgario.

DIMITAR PAPAŬOV

100 jarojn esperanto

LIGOJ INTER BULGARAJ KAJ RUSAJ ESPERANTISTOJ ĜIS 1944

En Bulgarian Esperanto penetras el Rusio fine de la pasinta jarcento. De post tiam datiĝas la ligoj inter bulgaraj kaj rusaj esperantistoj. De la rusaj esperantistoj la bulgaraj esperantistoj ĉerpas literaturon, sperton kaj inspiron. Ne hazarde la gvidanto de la bulgara esperantista movado d-ro Miloslav Bogdanov en 1900 estas proklamita honora membro de la tutrusia esperantista movado en Peterburgo.

En la komenco de nia jarcento Penko Petrov el Jambol korespondadis kun la rusa esperantistino Anna Selenberg el urbo Voroneĵ. En unu el siaj leteroj ŝi priskribas al li la eventojn

lige kun la unua rusa revolucio en 1905. Penkov tuj tradukas la leteron kaj ĝi estas publikigita en „Rabotničeski Vestnik“ („Laborista Gazeto“) n-ro 23/1905. Penkov korespondas en Esperanto ankaŭ kun Aleksandr Zarudnij — partopreninto en la liberiga rusa-turka milito 1877/78. Artikoloj de Penkov estis publikigitaj en „Voĉo de kuracistoj“ kaj en „La ondo de Esperanto“.

Stefan Apostolov el Kazanlâk korespondis kun d-ro A. A. Romanov el urbo Voroneĵ, kun R. T. Iridin k. a. La rusaj esperantistoj V. Vitoskij, Koĵnarskij, Evstifeev, Iv. Slezni-

kov k. a. subtenis revuon „Rondiranto“, kiu aperis en Plovdiv. Multaj rusaj esperantistoj estis abonantoj de la revuo kaj membroj de klubo „Stelo“. Inter ili estis ankaŭ Iv. Siraev, kunlaboranto de revuo „Rondiranto“. Aparte grava estis la helpo fare de Nikolaj Evstifeev — rusa lingvisto-vojaĝanto, kiu dum kelka tempo loĝis en Bulgario.

La konata bulgara esperantisto Panajot Hrtov subtenis personajn kontaktojn kun Georgij Davidov kaj havis la eblecon viziti lian bibliotekon en urbo Saratov, foliumi la unuan bulgaran E-gazeton „Mondlingvisto“.

Dum la 30-aj jaroj la kontaktoj inter bulgaraj kaj sovetaj esperantistoj plimultiĝas. Abundan privatan korespondadon kun sovetaj esperantistoj havis Tinka Lakova el urbo Sliven. Inter ŝiaj korespondantoj estis ankaŭ la leningrada bolŝevisto Paulo Sumigov, partoprenanto en la Oktobra Revolucio.

Kun sovetaj esperantistoj korespondis Trifon Hristovski, Stojan Kostadinov, Hristo Gorov kaj multaj aliaj bulgaraj esperantistoj.

Unu el la fontoj, el kiuj la komunista E-grupo „Balkana Liberiga Stelo“ ĉerpis sperton, estis la soveta E-gazetaro. La grupo „Balkana Liberiga Stelo“ ricevis la sovetajn E-gazetojn „Espero“, „Movado kaj Agitado“, „Bulteno“, „Homela Esperantisto“, „Malgranda Bulteno“, „Araneajo“ k. a.

En 1930 en urbo Alma Ata estas fondita speciala buroo por internaciaj laboristaj kontaktoj. Per korespondadoj kaj sendado de esperanta literaturo al bulgaraj korespondantoj la buroo senmaskigas la mensogajn elpensadojn de la burĝa kaj social-demokratia gazetaro pri la soveta realaĵo, inkluzive pri la esenco de la socialisma konkurado, helpas al eksterlandaj amikoj kompreni lian rolon kaj signifon en konstruado de la nova socio. BKP kaj la Sendependaj Laboristaj Sindikatoj organizis la ricevadon de korespondadoj el Sovet-Unio pere de proletaj E-organizoj kaj apartaj laboristoj-esperantistoj en vico da okcident-eŭropaj landoj, plejparte en Germanio. Tiuj laboristoj-esperantistoj, ricevinte la poŝton el USSR, metis la sovetajn leterojn en siaj kovertoj kaj jam de sia nomo sendis ilin al la bulgaraj esperantistoj — al la Laborista Esperantista Asocio (LEA).

Ege multajn leterojn el USSR resendis la germana komunisto Otto Bässler, persona kamarado de Ernst Thälmann, kiu laŭ komisiono de la Germana Komunista Partio fondas en Lejpcigo specialan buroon por proleta esperantista korespondado. Tiamaniere la revolucia gazetaro en Bulgario havis eblecon rakonti al la bulgaraj legantoj pri la grandiozaj sukcesoj de USSR.

DIMO MARTINOV

OMAGĖ AL LA PEREINTAJ HEROOJ

25 anoj de Sofia subdistrikta E-societo „D-ro St. Vasilev“ partoprenis mitingon, kiu okazis en la sino de Balkan-montaro, en la regiono de Etropole, apud vilaĝo Brusen. En tiu loko en malgala batalo pereis 19 partizanoj.

Kunvenis centoj da homoj, inter ili parencoj de la partizanoj, kunbatalantoj, adeptoj de la rezista movado kaj multaj civitanoj. Unu el la pereintoj estas d-ro St. Vasilev — patrono de la E-societo.

Delonge planata kaj bone organizita estis tiu ĉi vizito. Frumatene la societanoj per buso direktiĝis al la loko. Vojaĝi kun amikoj-esperantistoj estas agrable, krom tio la celo de tiu vojaĝo faris nin feliĉaj.

La ĉeestantoj en la mitingo multon eksciis el la flama raporto de la taĉmenta politikomissaro Nano Lalov. Li detale priskribis la kruelan batalon, parolis pri ĉiu pereinto aparte, pri ilia kredo en la hela estonto, pri ilia heroeco en la decidiga momento. Tri horojn daŭris la batalo de 31 partizanoj kontraŭ multnombraj ĝendarmoj.

Soldatoj kaj civitanoj sub la sonoj de „Vi falis, viktimoj...“ metis multnombrajn flor-

kronojn en la piedo de majesta monumento de la pereintoj. Inter ili estis ankaŭ la krono el



Florkronoj antaŭ la monumento de pereintaj kontraŭ-faŝistoj apud v. Brusen

Foto: VL. CIKALOV

freŝaj ruĝaj rozoj de E-societo „D-ro St. Vasilev“, kies prezidantino V. Nakova kaj vicprezidantino Ivanka Radkova estis invititaj okupi lokojn sur la tribuno, ĉe la oficialaj gastoj — Peko Takov, Mitka Grăbceva k. a. Sur tiu sankta loko la esperantistoj kaj ĉiuj

ĉeestantoj esprimis sian respekton al la glora ago de la pereintoj.

Societo „D-ro St. Vasilev“ per sia plua agado, per aktiva laboro gardos senmakula la helan nomon de sia patrono.

ZORA OŜANSKA

Beletro kaj poezio



Legendoj pri la partizanoj

(Omaĝe al la 40-jara datreveno post la fondo de la unua partizana taĉmento en Rodopi-montaro)

Se iam vi, nekonata leganto, vojaĝos tra vilaĝoj en Rodopa regiono, aŭ devojiĝos ĉe kristala fonto, kie ripozas tagmeze paŝtisto kun sia ŝafgrego, vi aŭdos legendojn pri la partizanoj. Rakontitaj de fantaziemaj montanoj, tiuj legendoj iras el buŝo al buŝo, de generacio al generacio.

Pro kio montanoj intermiksas realon kun fantazio? La partizanoj estis tute realaj homoj. Ilin ofte renkontis paŝtistoj kaj arbohakistoj aŭdis de ili rakontojn pri la lando, kie furiozis multjara sanga batalo inter germanaj faŝistoj kaj ruĝarmeanoj; ili aŭdis kiel la partizanoj revis pri la estonteco, kiam sur la tergloblo regos paco kaj amikeco inter diversnaciaj popoloj. Ili aŭskultis la elion de la bataloj inter ĝendarmoj kaj partizanoj. Ties aŭdaĉon kaj sentimecon admiris la montanoj, komparante ilin kun la apostoloj de la libero, kiuj iam subfosis la imperion de la otomanaj subpremantoj.

Por atingi siajn noblajn celojn, la partizanoj ne timis obstaklojn, ne indulgis sin mem. Per tio manifestis la volo de la bulgaroj al libero, frateco kaj egaleco.

Kiam en la neĝa kaj frosta vintro centoble pli multnombra ĝendarmaro persekutis la partizanan taĉmenton „Anton Ivanov“ en la intermonto de Văča-rivero, neniu el ili ektimis, neniu priploris sian sorton, neniu bedaŭris. Ĉar ekzistis neniu elirejo el tiu kaldrono, ili unuanime preferis pereon al la kapitulaco.

Post dektaga rezisto heroe pereis centdudek partizanoj. . .

Kiam venis la printempo, el trakiaj urboj kaj vilaĝoj venis novaj partizanoj kaj ilin renkontis kaŝe paŝtistoj kaj arbohakistoj. Simile al la pereintoj ili estis aŭdaĉaj, sentimaj, plenaj je kredo pri la baldaŭa venko kaj je volo liberigi sian landon.

Kaj kiam la patrinoj de la pereintaj partizanoj iris serĉi la kadavrojn de siaj gefiloj, la montaranoj jene konsolis ilin:

„Ili ne estas mortaj. Nek la rivero fortrenis iliajn kadavrojn, nek la vulturoj bekmanĝis ilian karnon. Ili vagadas kun fusiloj en mano kaj kantas pri la proksimiĝanta Ruĝa Armeo. . .“

Kiam venis la Tago de la Libero, tiuj patriinoj eliris el siaj loĝlokoj por renkonti la partizanojn. Neniu tamen revenis. La floroj, kiujn ili tenis en manoj, ornamis la brustojn de la vivaj partizanoj.

Sed por la rodopaj paŝtistoj kaj arbohakistoj neniu estis mortigita. . .

Se vi renkontos ilin ĉe iu kristala fonto aŭ sub la ombro de gigantaj abioj, vi aŭdos legendojn pri partizanaĵ heroaĵoj, ĉar la herooj neniam mortas en la memoro de la popolo.

ĤR. ISKROV

La unua pafo

Ili estis deko da viroj, sed atendis unu solan homon. Ĉi-foje li ne havos iun ajn ŝancon. Al li helpos nek lia falka rigardo, nek la kata elasteco kaj facileco de liaj movoj. . . Jen finfine li venas.

— Haltu! Mi pafos!

La homo kun palto surmetita sur la larĝajn ŝultrojn haltis tuj. Malantaŭ la divida sulko de la Bojaĝiiska-agro embuske faŭkis la aperturoj de sep karabenoj. Ironie kaj memkontente okulstreĉis la viroj, metinte fingron sur la ĉano.

— Kapitulacu, Vanjo! Ĉiuflanke vi estas ĉirkaŭita! — raŭkvoĉe krias serĝento Radulov. La homo estas tiel proksime antaŭ ili, ne faras iun ajn provon pri rezisto, silente kaj obeeme levas siajn brakojn. La serĝento jubi-

las. La pafiloj malleviĝas kaj la viroj en bluaj uniformoj stariĝas por meti al li la mankatenojn.

En la sekva momento neniu el ili povis kompreni, kio ĝuste okazis. Simple ili ne vidis kiel la „viktimo“ desaltis kiel streĉita risorto. Ili rekonsciiĝis, kiam li jam kuris al la Cigurin-somerŝafejo. Ekeĥis furioza pafado. Unu kuglo pikis la kuranton en la ŝultro. El la arbustoj tri kaŝitaj ĝis nun policianoj ankaŭ komencis pafi.

Abrupta flankensalto kaj la roko ŝirmas la partizanon. Maldika sangstrio ekfluas laŭ lia brako kaj kolorigas la klaran kiel larmon akvon. De tri flankoj oni pafas sencele, sed li atendas. Inter la verdaj branĉetoj kaŝe elrigardas ser-

ĝento Radulov, kiu estis tiel certa pri la facilpredo. Anstataŭ la promesitan de lia ĉefo premion, li ricevas kuglon. Falas ankoraŭ tri policianoj.

Krepuskiĝas. Dum la policianoj klopodas ĉirkaŭ siaj vunditoj kaj mortigitoj, la partizano malproksimiĝas de sia unua ŝirmejo kaj sin kaŝas en la radikoj de grandega arbo ĉe la riverbordo.

Tio okazis la 27-an de junio 1941.

TOMA PENKOV

*Ivan Kozarev — Balkan, la unua partizano en Bulgario, naskita la 14-an de januaro 1901 en vilaĝo Dobri-nište.

• VIZIO

Vesperkrepusko super la baraĵon falas.
El sia noktazil' elflugas ar' vesperta.
Zefir' krispigas la supraĵon de la lago
kaj luna disko grizajn nubojn ore pentras.

Ripozas mi sur bordo de la lag' skarлата,
observas la ondadon kaj la pensoj flugas.
Subite vidas mi vizaĝojn nekonatajn,
elpaŝas ili el la lago tre profunda.

Jen strangaj estas la vizaĝoj de l'viktimoj:
kun frunto fendohava kaj sen ore, sen nazo:
okuloj elpikitaj de partizaninoj —
kruela malamiko ilin ja frakasas.

Mallaŭte plaŭdas ondoj de la monta lago
kaj al mi flustras jen knabino sen okuloj:
„Batalis ni ĉi tie sub la ruĝa flago,
taĉmento nia nombris centdudek bravulojn;

dek tagojn daŭris la faŝista ofensivo,
dek tagojn frostis ni sur neĝo kaj glacio
ĝis ĉiuj ni oferis nian junan vivon,
falĉataj per mitraloj kaj artilerio.

Ni estis junaj, amis vivon, patran domon,
neniu volis morti sur la neĝ' malvarma,
sed por libero sankta, por popola bono
renkontis ni la bajonetojn de l'ĝendarmoj. . .“

Min vekis kapreolo per timemaj paŝoj.
Ĝi trinkis puran akvon per mallongaj glutoj.
La luno post malhela nubo tuj sin kaŝis
kaj malaperis la vizi' en lag' profunda.

1984

Ĥ. M. ĤRIMA

AMO DUMVIVA

Adiaŭ, amiko brigadkomisaro,
vi restas tutsola sur roko montara,
ĉar kuŝas vundita je ambaŭ piedoj.
La vundoj sangadas, konscion vi perdas. . .

Adiaŭ, amiko, popolo nin petas
ataki tiranojn, ĝin kiuj surtretas.
En nordo transnaĝis la bluan Danubon
sovetaĵ soldatoj. Ni ilin brakumos.

Brigad' partizana eniras la urbon.
Renkontas ĝin homoj kun floroj kaj bulkoj.
Ruĝflagoj la domojn proletajn ornamas.
Maljunaj kaj junaj, infanoj aklamas.

Alpaŝas la estron knabino blankdenta:
„Mi havis fianĉon en via taĉmento;
pro kio forestas? Lin kio atingis?“
La estro senvorte transdonas or-ringon.

Ŝi kisas la ringon, respondas mallaŭte:
„Vi kaŝas la veron, revenos li baldaŭ;
heroo li estas, neniam pereos.
Mi ĵuris atendi — sen ploro, sen veo. . .“

Juneco forpasis, grizigis la haroj,
trasulkis la frunton kaj vangojn dekjaraj.
Ŝi ofte direktas rigardon al monto,
de kie descendas amata heroo. . .

1984

Ĥ. M. ĤRIMA

La redakcio anoncos la rezultojn de la Internacia Literatura Konkurso okaze de la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario en 1944 en n-ro 11/1984.



KONTRIBUO AL LA MONDA E-MOVADO

La organizita esperantista movado komenĝis antaŭ cent jaroj, tuj post la apero de la verko de L. L. Zamenhof pri la Internacia Lingvo Esperanto. Pri Esperanto ekinteresiĝis ankaŭ la laboristaro en diversaj landoj kaj precipe la kleraj kaj klaskonsciaj laboristoj, membroj de socialdemokrataj, socialistaj kaj komunistaj partioj kaj speciale post la venko kaj sub la influo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio en Sovetunio. Nome pri la laborista E-movado estis aperigita la 24-paĝa broŝuro „BLEA kaj IPE“ kun subtitolo „Historio de la Brita Laborista Esperanto-Asocio kaj Internacio de Proleta Esperantistaro“. La libreto estis kompilita de Arthur Nobes.

A. Nobes priskribas ta fondiĝon de Brita Laborista E-Asocio kaj ĝian organizan kaj propagandan agadon, rakontas pri ĝiaj unuaj pioniroj Mark Starr, Horace Clayton, Gladys Keable kaj ŝia edzo Bill Keable, ŝi — organizanto kaj li — redaktoro de „Ruĝa Esperantisto“, pri K.R.G. Stumer, la geedzoj Sidney kaj Irene Smith k. a. „BLEA“ naskiĝis en la jardeko 1921-1930 — klarigas la aŭtoro — kaj dum kelkaj jaroj estis sub la ombro de Sennacieca Asocio Tutmonda. Sed en la jaro 1931 fundamentaj malkonsentoj aperis inter la membroj“. Plue li skribas pri la sennaciecaj ideoj de la fondinto de SAT Eŭgeno Lanti, kiuj estas tute nereaj. „SAT finfine estis kaj ankoraŭ estas kontraŭsovetaj. Jen tre grava punkto. . .“ Tiun sian penson Nobes konkludas per la vortoj pri Soveta Unio, ke „... ĝi restas esperujo por paco kaj estonta progreso.“ En unu jarkunvena rezolucio oni decidis: „BLEA kondamnas la kontraŭsovetan planon de la SAT-gvidantoj. . . kaj rompas ĉiujn rilatojn kun SAT“. La aŭtoro skribas ankaŭ pri la fondiĝo de Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE) kaj de Proleta Esperanto-Korespondado (PEK) kaj pri ties problemoj kaj agado.

La aŭtoro de la broŝuro „BLEA kaj IPE“ donas plurajn historiajn faktojn pri IPE, PEK, pri IPE kaj hitlerismo, pri konferenco kaj

kongresoj de la asocio, en aparta ĉapitro li skribas: „Kie faŝismo floras, Esperanto mortas“. En la epilogo li eksplikas la malpermeson de la E-movado en Sovetunio kaj ĝian plivigliĝon en la lastaj jaroj. Sed iuj faktoj ankoraŭ ne estas konataj al ni bone, pro tio ne bone estas klarigitaj. Kiel estas menciite „Eldonas ĉi-libreton kolekto de britaj socialistoj en la E-movado, kiuj dediĉas ĝin al Gladys Keable, energia kaj kuraĝa batalantino por homa interkompreno kaj progreso“. En la libreto estas pluraj fotoj de BLEA-kongresanoj kaj konferencanoj, skizoj desegnitaj de Gladys Keable mem, prenitaj el „Ruĝa Esperantisto“.

La libreto de Arthur Nobes estas interesa kaj grava kontribuo al la historio de la monda laborista E-movado, de IPE kaj PEK. Ĝi estas havebla ĉe s-ino Penelope Mybin, 48 Maistone Road, Kent ME1 1RJ, Anglio. Ĝi kostas po L1 (inkluzive poŝtkostojn), aŭ alilanda egalvalora ŝumo.

IVAN KEREMIDĈIEV

KOMPLETIGO DE LA ESPERANTO-LEKSIKO

„Sugestoj por kompletigo de la jura/diplomatia terminaro“ de d-ro Ladislao Dubravskiy, kun antaŭparolo de prof. d-ro Ivo Lapenna. Eldono de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, 1984. La verko aperis kiel „Kontribuo al la Jubilea Jaro 1987“ kaj fakte estas dua — reviziita eldono de la samaj Sugestoj, publikigitaj en la Internacia Jura Revuo, n-roj 1—2/79 kaj 1/80.

La unua el la du partoj de „Sugestoj por kompletigo de la jura/diplomatia terminaro“ rilatas al „Novaj vortoj necesaj al la jura, administra kaj diplomatia lingvo, ne troveblaj en Plena Ilustrita Vortaro 1970“, do, laŭ tiu ĉi subtitolo, temas ne nur pri la „jura/diplomatia terminaro“, kiel tekstas la titolo. Fakte, tiu ĉi parto, ampleksanta 50 vortojn, entenas ne nur jurajn, administrajn kaj diplomatiajn, sed ankaŭ ĝeneralajn vortojn (ekz. **desaponti**, **desavui**, **disdeĝno**, **impedi**, **inserti**, **pauŝalo**, **preso**, **sukuro**, **supliki**). Impresas, ke multaj el la vortoj (ekz. **desaponti**, **disdeĝno**, **detento**, **dispensi**, **ekvito**, **ostento**, **pandaro**, **plenrajtigito**, **preamblo**, **prejudico**, **receptio**, **soliciti**, **sukuro**, **ŝmugli**, **talvego**) estas, laŭ la aŭtoro, ne liaj, sed de aliaj proponintoj (kies nomojn li indikas. Mankas tamen klarigo, pro kio tiam tiuj ĉi vortoj estas inkluditaj en eldono, aperigita kiel eldono de la aŭtoro.

El la subtitolo evidentas, ke la aŭtoro sub **novaj** komprenas vortojn, kiuj mankas en PIV 1970.

Ĉiu vortaro estas registro de vortoj, kies ekziston la vortaristoj sukcesis konstati. Tio validas eĉ pri „plenaj“ vortaroj. Do, neekzisto en PIV 1970 ne signifas neekziston ĝenerale.

Kiel novajn vortojn (t. e. novajn vortformojn) la aŭtoro enlistigas interalie: **domini, inserti, klado, ministro-prezidanto, parolnoto, preso, presto, skripto, solliciti, stipuli, ŝmugli, talvego.** Ĉiuj ĉi vortoj tamen delonge ekzistas en la E-leksiko. Ili troviĝas eĉ en la Esperanto-Bulgara Vortaro 1963, ĉu kiel memstaraj vortoj, ĉu kiel partoj en kunmetitaj vortoj.

La dua parto de la verko rilatas al „vastigo de la senco ĉe kelkaj vortoj troveblaj en Plena Ilustrita Vortaro 1970“.

Fakte, evidentiĝas, ke en multaj okazoj la proponita vastigo koncernas ne vortojn trovitajn de la aŭtoro en PIV, sed konstruitajn de li mem vortojn kaj esprimojn. Ekz., el la vortoj **ago, doĵeno, citi, komisariato, batali, delegi, imuneco, artikolo, fina, protokolo, limo, akto, pupo** la aŭtoro formas: **agosfero, aĝdoĵeno, alciti, altkomisariato, batalhalto, delegita povo, diplomatia imuneco, enartikoligi, fina akto, finprotokolo, limdifino, neamika ago,**

pupŝtato. Evidente, la „vastigo“ venas rezulte de kunmeto de apartaj vortoj, ne pro la vastigo de vortoj trovitaj en PIV de la aŭtoro. Fakte, la kunmeto kondukas ne al vastigo, sed al limigo de la senco.

Interese estas, ke la aŭtoro konsideras kiel vastigon la ŝanĝon de la gramatika kategorio de la vorto. Ekz., **eksteritorieco** estas, laŭ la aŭtoro, vastigo de la vorto **eksteritoria**, stacii estas vastigo de la vorto **stacio**. Ĉi-okaze temas ne pri vastigo aŭ malvastigo, sed pri diverseco de la leksika esprimo.

Kvankam tiu ĉi parto rilatas al la „vastigo“, tamen ĝi entenas ankaŭ vortojn, kiuj ne estas troveblaj en PIV. Ekz., **deĵono, dineo, tutoro.**

Malgraŭ la menciitaj neĝustajtoj la verko de d-ro L. Dubravszky estas utila, ĉar multaj el la proponoj, sendepende de tio, ĉu ili estos aŭ ne estos akceptitaj, vekas ideojn kaj povas helpi la strebon al pliriĉigo de la leksika trezoro de Esperanto.

LJUBOMIR MIHAJLOV

INTERNACIA JUNPIONIRA E-TENDARO

Iom post la sunleviĝo sur la vasta teraso antaŭ la belega konstruaĵo de la Internacia Esperanto-Kursejo en vilaĝo Pisanica estas viciĝintaj uniforme vestitaj junpioniroj el Hungario kaj Bulgario — partoprenantoj en la Internacia Junpionira Somera Esperanto-Tendaro.

Aŭdiĝas la ordono de la junpionira gvidantino Jordanka Gerginova:

— Junaj pioniroj, atenton! Reprezentantoj de la grupoj, raporton komencu! . . .

Unu post la alia ekstaras rekte antaŭ sia gvidantino Spaska Spasova, Ina Holeviĉ kaj Julia Nedjalkova el Sofio, Mariana Viság el Miskolc kaj István Szánya el Dunakeszi, Hungario, kiuj raportas, ke la junpioniroj el iliaj grupoj estas pretaj por inaŭguro de la Tago de Bulgario, dediĉita al la 40-a jubileo de la Dimitrova Junpionira Organizaĵo „Septemvriĉe“.

Post akcepto de la raportoj, Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“, kiu gastis al la junpioniroj, salutis ilin en la nomo de la Centra Estraro de BEA kaj de IEK. En sia parolado li substrekis, ke sian feliĉan nuntempon la junpioniroj en Bulgario ŝuldas al la sinofera batalo de la heroaj kontraŭfaŝistoj kaj al la venko de la socialisma revolucio je la 9-a de septembro 1944. D. Ĥitrov

bondeziris al la junpioniroj agrablan pasigon de la tendaraj tagoj kaj sukcesan lernadon de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu unuigas kaj amikigas ilin.

Laŭ malnova popola kutimo la bulgaraj junpioniroj bonvenigis siajn hungarajn geamikojn ĉe la ŝtuparo de la kursejo per pano kaj salo, ornamante ilin per geranio — simbolo de sano.

La saman tagon vespere en la salono de la kursejo la bulgaraj junpioniroj prezentis muzikan kaj literaturan programon, montris verajn artismajn talentojn. Bonege sin prezentis la jam famiĝinta grupo „Buntaj Kravatoj“ el Bojuriŝte (sub la arta gvidado de Petăr Rusinov), Spaska Spasova kaj Conka Stojanova el Sofio, la junaj komikuloj Mario kaj Marin el Slivnica kaj multaj aliaj, kiuj ricevis la entuziasmajn aplaŭdojn de la ĉeestantoj.

De la 20-a ĝis la 30-a de julio j. k. la partoprenantoj en la unua Internacia Junpionira Somera Esperanto-Tendaro en Pisanica — 39 bulgaraj kaj 37 hungaraj junpioniroj, pasigis dek neforgeseblajn tagojn de lernado, amuzado kaj interesaj ekskursoj. Sub la gvidado de spertaj pedagogoj: Petăr Rusinov (tendarestro), Antoaneta Tatarova kaj Jordanka Gerginova el 90-a kaj 61-a bazaj sofiaj lernejoj, Maria Busai, Fázold Miklós kaj Sznagyik Sándorné


el Miskolc, Berencsi Katalin kaj Gáspár Sándor el Dunakeszi, Hungario, estis organizitaj sportaj konkuroj kaj ludoj, vizito de la Distrikta Junpionira Domo en urbo Smoljan, karnavalo kaj literatura vespero kun premioj.

Agrabia kaj enhavoriĉa estis la literatura-muzika vespero de la hungaraj junpioniroj.

Dum dek tagoj la partoprenantoj en la junpionira tendaro ankaŭ obstine kaj diligente lernis Esperanton sub la lerta instruado de docento Georgi Dimov el la Supera Ekonomia Instituto en Varna kaj de Ani Dimitrova, E-instruistino ĉe IEK. Laŭ la rekta metodo kaj per facilaj lernotekstoj, per muzikado kaj kantado la junaj gelernantoj rapide progresis en la Internacia Lingvo. Estis kortuŝe vidi la ridetantajn vizaĝojn de la bulgaraj kaj hungaraj junpioniroj strebantaj konversacii en Esperanto! Ĉie regis vera amika internacia etoso kaj interkompreniĝo.

Interŝanĝo de adresoj, invitoj por reciproka gastado kaj precipe — la komuna deziro denove renkontiĝi kaj perfektigi siajn lingvokononjn dum la venontjaraj junpioniraj E-tendaroj en la ĉarma Pisanica — tia estis la bildo de la adiaŭa vespero.

La ideo pri realigo de Internacia Junpionira E-tendaro en Pisanica estas laŭdinda. La



Partoprenintoj en la Internacia Junpionira Somera E-Tendaro

gvidantaro de IEK tamen devas ĝin diskongiti vaste, por ke la tendaro estiĝu vere internacia kun partopreno de junpioniroj el ĉiuj socialismaj landoj.

RADI BANĈEVSKI

DU GRAVAJ ARANĜOJ

De la 23-a ĝis la 25-a de junio k.j. en la Internacia E-Kursejo en Pisanica (Rodopimontaro) okazis nacia seminario de E-instruistoj kaj nacia renkontiĝo de la lerneja E-junularo. En la du aranĝoj partoprenis ĉ. 75 personoj.

En la seminario estis faritaj jenaj prelegoj: „Nuntempaj instrumentoj de Esperanto“ de Marin Băcev — ĉefa metodikisto ĉe CE de BEA, „Nia Esperanto-korespondado“ de Hristo Manolov el u.Polski Trambes; „Lingvaj demandoj“ de Kunĉo Vălev. Post ĉiu prelego okazis diskutoj. Aparte viglan intereson vekis la riĉa sperto en la E-korespondado de la esperantistoj en P. Trambes, prezentita de Manolov. Per ĝi ili havas ligojn kun esperantistoj el la tuta mondo. Tiujn ligojn ili uzas ankaŭ por interŝanĝo de libroj, instrumaterialoj, periodaĵoj, afiŝoj k. a., kiujn ili poste uzas por aranĝi ekspoziciojn, vitrinojn k. a. ĉe diversaj okazoj. La esperantistoj en Polski Trambes mem reeĥas per similaj materialoj al petoj de eksterlandaj esperantistoj. Tiel ili bone popularigas nian landon kaj la bulgaran E-movadon.

La seminario finiĝis per viglaj diskutoj pri la organiza stato de nia instrulaboro en la lernejoj. La prezidanto de la Instruista Sekcio

de BEA — Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA, malfermis la diskutadon per starigo de tuta sistemo de entreprenoj kaj taskoj por varbado de instruistoj al niaj E-kursoj, por plialtigo de la kvalito de nia instrulaboro, por reteno de instruistoj kaj gelernantoj en niaj vicoj. Aparte li substrekis la gravegan taskon organizi la lernantaron en lerneajn E-klubojn, okupi ilin per konstanta peresperanta laboro (amatora artagado, parolantaj rondoj, korespondado, regula organiza kaj kultura vivo ktp.).

Por la gelernantoj estis aparta programo: prelegoj, lernado de E-kantoj, lingvaj ludoj.

En la vesperoj okazis buntaj belartaj programoj: oni recitis, kantis. Aparte kontribuis por tiuj programoj la aŭstra esperantisto Max Rieder, kiu tiumomente gastis al la Kursejo. Li projekciis ege interesajn kolorajn diapozitivojn pri siaj veturadoj tra Afriko kaj Hindujo.

En la lasta tago la partoprenantoj havis la plezuron konatiĝi kun la belega urbo Smoljan, viziti ĝian novan muzeon, kaj ankaŭ la planedaron.

PETĀR IVANOV

NOVA MEDICINA E-SOCIETO

La 5-an de julio 1984 la Distrikta Estraro de BEA — Loveĉ, organizis solenan kunvenon de la nova medicina E-societo „Sanlaboristo“ en urbo Lukovit. Ĝi estas dua en la distrikto kaj unua en la urbo medicina E-societo. Ĉeestis la prezidanto de la Medicina Sekcio ĉe CE de BEA — Sofio, profesoro d-ro Kiril Popov, la tuta estraro de la regiona hospitalo, E-gekursanoj kaj civitanoj de Lukovit, reprezentantoj de la Distrikta Estraro, de la medicina societo „D-ro Zamenhof“ kaj de aliaj esperantistaj societoj en Loveĉ.

Oni preparolis organizajn demandojn, antaŭstarantajn taskojn, la partoprenon de medicinistoj en la Kvara Nacia Medicina Esperantista Konferenco en IEK-Pisanica, la organizon de regiona medicina interŝanĝo de sperto aŭ eventuale de la Kvina Nacia Medicina Esperantista Konferenco en urbo Lukovit.

D-rino TJURAN OMER



Membroj de la novefondita Medicina E-Societo en urbo Lukovit

MONDONACO

Nia estimata kamarado Simeon Panĉev, 86-jara, el Mezdra, faris mondonacon al E-societo „N.J.Vapcarov“ — Mezdra. La societaj membroj elkore dankas kaj bondeziras al li sanon kaj longvivadon.

E-Societo „N. J. VAPCAROV“, Mezdra

SPERTINTERSANGO INTER E-ENTREPRENOJ

En junio k.j. gastoj de la laboruloj el la E-entrepreno „Globus“ — Pleven, estis iliaj kolegoj el parenca entrepreno en Plovdiv. Ili vizitis la historiajn lokojn de la bulgara-soveta amikeco en Pleven. Estis metita florkrono ĉe la komuna tombejo.

Ambaŭ entreprenoj estas avangarduloj. Ili jam en majo plenumis siajn sesmonatajn planojn kaj nun laboras laŭ plano de la dua duonjaro de 1984.

Avangardaj laboruloj interŝanĝis informojn pri siaj atingoj laŭ sektoroj. Ankaŭ utila kaj interesa estis la spertintersanĝo inter la ekonomiistaj oficejoj de ambaŭ entreprenoj rilate la aplikon de ekonomia mekanismo.

La renkontiĝo kontribuis por ankoraŭ pli altkvalita kaj intensa plenumo de la estontaj planoj.

DIMITAR KAMENOPOLSKI

INSTRUISTA SEKCIO FONDITA

En Varna fondiĝis Instruista Sekcio, kiu portas la nomon de la neforgesebla Zora Mladenova — Hans.

Ĉiun monaton la geinstruistoj kunvenas por pridiskuti diversajn pedagogiajn demandojn, artikolojn de revuo „Bulgara Esperantisto“, por aŭdi informojn pri gravaj novaĵoj el la E-gazetaro aŭ por interŝanĝi sperton.

MARIA TODOŠEVA

NOVAĴOJ EL STARA ZAGORA-DISTRIKTO

En Unueca Politeknika Mezlernejo „P. Javorov“ — Ĉirpan, ĉe la Klubo de Internacia Amikeco estas fondita lernanta E-klubo el 30 ĝenerantoj, finintaj unuagradan kurson de Esperanto.

En la venonta lernojaro en la Ekonomia Kemia Kombinato — Stara Zagora, oni fondos klerigan laborgrupon por lernado de la Internacia Lingvo, kiu funkcios egalrajte kun ĉiuj klerigaj laborgrupoj en la Kombinato.

PETKO BONEV

POEZIA RECITALO DE PENKA PAPAZOVA

La 21-an de junio k. j. vespere en E-klubejo „M. Gorkij“ — Jambol, oni organizis recitalon de la E-poetino Penka Papazova, dediĉita al la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario kaj al la 100-jara jubileo de Esperanto.

P. Papazova verkas en Esperanto kaj bulgara lingvo. Al la esperantistaj legantoj ŝi fariĝis konata depost 1974. Ĝis nun Papazova gajnis kvin premiojn en internaciaj konkursoj pri originala E-poezio kaj ankaŭ la unuan premion en la konkurso de „BE“ okaze de la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato.

La recitalon ĉeestis membroj de la Distrikta Estraro de BEA — Jambol kaj de la E-societoj en Jambol — „M. Gorkij“, „Aŭroro“, „Sano“, „Semaforo“ kaj multaj gastoj.

STOJAN POPOV

DAMJAN PACEV — 90-JARA

La 15-an de aprilo k. j. la plovdiva esperantisto Damjan Pacev festis sian 90-jariĝon.

Li tre juna lernis Esperanton laŭ la lerno-libro de G. Oreškov, sed aliĝis al la E-movado en 1911. Unuaj liaj kamaradoj-esperantistoj estis Leon Gartner kaj Stojan Marev el Ĉepelare, kiu tiam laboris en Plovdiv.

D. Pacev studis kaj laboris en kelkaj landoj de Eŭropo kaj kontaktiĝis kun multaj alilandaj esperantistoj. Ankoraŭ pli vasta estas lia korespondado. La korespondantoj de Pacev loĝas en Ameriko, Aŭstralio, Japanio. Li aktive partoprenis la vivon de plovdivaj esperantistoj. Multajn jarojn Pacev laboris kun la elstaraj esperantistoj D. Malĉev, P. Stoev, Iv. Bataklijev.

Poste, kiam Damjan Pacev perdis sian vidpovon, li estis iniciatinto, kaj per la helpo de Iv. Bataklijev — unu el la fondintoj de la grupo de blindaj esperantistoj „Lumo“ ĉe la plovdiva E-societo „Kulturo“ (nuna E-societo „Lumo“) kaj ĝia unua prezidanto. Pacev longe estis individua membro de UEA. En 1968 li estis honorita per la arĝenta insigno de BEA, kaj lige kun lia 90-jara jubileo la Centra Estraro de BEA distingiĝis Damjan Pacev per ora insigno.

VLADIMIR JELEV

GASTO EL LA URBO-HEROO BREST

Gasto de la ŝumenaj esperantistoj estis Viktor Jaroŝeviĉ el la urbo-heroo Brest, Belorusa SSR.

En kunveno de E-societo „Vekiĝo“ — Ŝumen, V. Jaroŝeviĉ rememorigis heroajn momentojn de braveco kaj abnegacio de la sovetaj soldatoj el la Bresta garnizono, unuaj en la Granda Patrolanda Milito de USSR repuŝintaj la malamikan armeon; rakontis pri la nuntempa, kun pli ol 300 000 loĝantoj urbo Brest — centro de prosperanta regiono. Intereson elvokis liaj informoj pri la agado kaj iniciatoj de la membroj de la antaŭ nelonge fondita E-grupo „Citadelo“, kies prezidanto li mem estas. Liaj finaj vortoj, ke neniam plu ripetigu la tragedio de la Dua Mondmilito, trovis varman apogon ĉe ĉiuj ĉeestantoj.

Viktor Jaroŝeviĉ ĉeestis la solenaĵon okaze de finiĝinta E-kurso por komencantoj ĉe la Klubo de Esperantistoj „Metalurgo“ ĉe SKOA „St. Stamenov“ — Ŝumen. Akompanite de grupo da ŝumenaj esperantistoj, V. Jaroŝeviĉ partoprenis en la Scienc-Praktika E-konferenco „40 jaroj de socialisma revolucio en Bulgario“ en Velingrad kaj vizitis ankaŭ la urbojn Plovdiv, Sofio kaj Varna.

CV. TODOROV



Gekursanoj el la Teknika Mezlernejo „D. Mendeleev“ — Varna. Kursgvidantino — Ĥristina Zaharieva.

Tra la E-mondo

TEATRAJO PRI ESPERANTO EN LA BRITA TELEVIDO

La 27-an de majo k.j. la brita televida kanalo BBC 2 elsendis sepdekminutan teatraĵon, en kiu Esperanto okupis centran lokon. La teatraĵo estis titolita „High Hopes“ (Altaj esperoĵ), verkita de Jill Hyem. En ĝi rolis pluraj vaste konataj britaj geaktoroj: Virginia McKenna, Dandy, Nichols, Lesley Manville, Philip Joseph kaj la japana aktoro Eigja Kusahara.

Lastatempe oni pli kaj pli ofte menciis Esperanton en britaj programoj — ofte en kvizoj. Krome britaj elsendejoj de tempo al tempo petis informojn de E-organizaĵoj. La teatraĵo tamen ŝuldas sian ekeston al baza enkonduka leciono, eldonita de Esperanto-Asocio de Britio, per kiu la verkantino unue konatiĝis kun la Internacia Lingvo.

En la teatraĵo, kiu evoluis okaze de interkonsentita kursa renkontiĝo de kelkaj esperantistoj kaj lernantoj, leviĝis diversaj argumentoj por kaj kontraŭ la Internacia Lingvo. Multaj britaj esperantistoj, inkluzive de Brian Barker, organizanto de la sukcesa parlamenta pregrupo por Esperanto, opinias la teatraĵon bonega informado pri Esperanto.

Internacia Gazetara Servo de UEA

KUBAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Kuba Fremdlingva Eldonejo, Jose Marti kunlaboro kun Kuba Esperanto-Asocio komencas eldoni librojn en la Internacia Lingvo.

La unua eldonita libro havas titolon „La historio absolvos min“. Temas pri la sindefendo de d-ro Fidel Castro, nuntempa prezidanto de Kubo, en la juĝproceso de Moncada, en 1953.

En preparo estas du pliaj gravaj verkoj „En marŝo kun Fidel“ kaj „La ŝtata organizo de Kubo“. Sekvos multaj aliaj, originalaj kaj tradukitaj, pri plej diversaj temoj: historio, literaturo, politiko, scienc-fikcio ktp.

Per ĉi tiuj eldonaĵoj vi povos konatiĝi kun la ĉiam verda Kariba Insulo, kie la suno forte brilas kaj la amikeco abundas.

Interesitoj pri po-granda aĉetado aŭ/kaj interŝanĝado de libroj bv. peti informon ĉe: Ediciones Cubanas, Apartado 605, C. HABANA 1, Kubo.

* * *

Esperantistoj vizitantaj Kubon estas invitataj al la Centra Oficejo de Kuba Esperanto-Asocio (Neptuno 201, stratangule Industria, Centro-Havano. Telefono: 61 0576.

ESPERANTO-AGADO EN BUKAREŬTO

La sciencan agadon de esperantistoj de la rumana ĉefurbo organizas Bukareŝta Sekcio pri filologiaj sciencoj. La kulturan agadon organizas Bukareŝta Esperanto-Klubo, en la kulturdomo de la 3-a distrikto.

La sekcio „Interlingvistiko kaj Esperantologio“ estas gvidata de univ. prof. Gabriel Tepelea. La sekretario de la sekcio estas univ. asistanto Constantin Dominte. La sekcio organizas monatajn kunsidojn, en kiuj oni pridiskutas sciencajn kaj historiajn problemojn de la lingvo.

Bukareŝta E-Klubo organizas ĉiusemajnajn kunsidojn, en kiuj oni prezentas en Esperanto diversajn temojn (sciencajn, kulturajn, sociajn, artajn ktp.) kaj lingvajn demandojn. Samtempe okazas kurso por komencantoj. La klubon gvidas Bunea Bunescu Ion, helpata de eta kolektivo. Sekretario estas Petre Teodorescu.

C. A.

BULTENO DE NIKARAGVA ESPERANTOLIGO

La juna asocio aperigis pasintjare la 1-an numeron de sia organo. Ili petas diversajn lernolibrojn, legmaterialojn, vortarojn kaj aliajn helpilojn por disvastigi Esperanton en Nikaragvo. La bultenon redaktis José Dolores Gaitan Moreno, Apartado 3912 MANAGUA, Nicaragua.

ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTAJ (AVE)

Fondiĝis Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE). La celo de AVE estas disvastigo de Esperanto inter la membroj de la „verdaĵ“ politikaj partioj, kiuj interesiĝas pri ekologia politiko, por ke ili povu pli efike plenumi sian laboron por nia planedo.

La unua konferenco de AVE okazis en Belgio fine de marto k. j., antaŭ la Kongreso de Eŭropaj Verduloj en Lieĝo.

Pliajn informojn donas: Christopher Fettes, St Columba's College, DUBLIN 16, Irlando.

ALVOKO

Mi bezonas malnovajn kaj modernajn poŝtkartojn pri Esperanto (ĉiuj temoj akceptataj) por organizi ekspoziciojn en diversaj lokoj oficialaj: grandaj entreprenoj, ministerioj ktp. . .

Ni ĉiuj nepre konsideru la gravan propagandan flankon de tiu entrepreno.

„Senpolvigu“ viajn arkivojn kaj sendu al:

GICQUEL CLAUDE
38 rue BABEUF
94600 CHOISY LE ROI
FRANCIO



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Elena Popova (48-jara esperantistino) — BG-9300 Tolbuĥin, p. k. 72 — kun samaĝuloj el ĉi.

Penka Dineva (45-jara esperantistino) — BG 8650 v. Malomir, Jambolski okr. — kun Italio, Japanio, Pollando, Aŭstrio, Sovet-Unio, Ĉeĥoslovakio pri literaturo, kino, teatro, muziko.

HUNGARIO

Marcella Kovács kaj Zuzanne Kovács (mezaĝaj fratinoj, instruistinoj), Bakonszeg, Deak F. u. 2, H-4164 — kun bulgaroj pri belliteraturo, historio, naturo kaj ĉiutaga vivo.

Georgo Dankó (22-jara komputisto) — Budapest, Batthyány u. 77, H-1184 — kun bulgaraj gejunuloj pri div. temoj.

Jozsefné Nagy (26-jara esperantistino) — Erdőtelek, Arany János ut 1, Heves megye — kun ĉi.

Papp Gyöngyi (22-jara oficisto) — H-5515 Ecsegfalva, Ságvári E. 8, — kun gejunuloj el ĉi pri vojaĝoj kaj dancoj.

Gosi Hajnalka (6-a klaso) — Sárszentlőrinc, Bocskai, u. 2, H-7047 — kun 11- kaj 12-jaraj geknaboj; kolektas buŝtukojn, pm kaj kalendaretojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

Jaroslav Pokorný (inĝeniero) — Nova 832, CS-691 42 Valtice — kun alpistoj pri rokgrimpado.

M. Junkova (14-jara knabino) — Radotinská 388, CS-15 900 Praha — Valka Chuchle — kun samaĝuloj el ĉi; kol. BK de hundoj kaj katoj; respondo garantiata.

DDR

Bernd Mann (26-jara elektronika faklaboristo) — DDR-7024 Leipzig, Baunakoh 3 — dez. kor. tutmonde pri turismo, muziko, teatro kaj botaniko.)

POLLANDO

Jolanta Uzlis (studentino) — ul. Chocimska 15/1, PL-76-200 Slupsk — kun ĉi pri popolkutimoj, turismo kaj belliteraturo.

BRAZILIO

Aleksandro Carneiro (21-jara studento de historio) — RVA Manuel Barreto 98/202 Grace — Salvador — Bama; Lep. 40 000 — kun ĉi pri historio, kemio, vojaĝoj; kolektas PM, BK, mapojn.

ENHAVO

N. ZIDAROV. Bulgario	11
Ĥr. GOROV. Nia festo	1
Ĥ. LEVI. Brila bilanco	2, 3
L. MIĤAJLOV. Ekonomia Esperanto-agado	3
D. GANEV. Oni neniam forgesos ŝin	4, 5
D-ro Cv. STAMENOVA. Kuracisto-partizano	5
H. R. PODIMAĤINA. Unuaj sur bulgara tero	6
D. PAPAŖOV. Fidela helpanto de la partio	6, 7
D. MARTINOV. Ligoj inter bulgaraj kaj rusaj esperantistoj ĝis 1944.	7, 8
Z. OŜANSKA. Omaĝe al la herooj	8, 9
Ĥr. ISKROV. Legendoj pri la partizanoj	9
T. PENKOV. La unua pafo	9, 10
Poezio	10
IV. KEREMIDĤIEV. Kontribuo al la monda E-movado	11
L. MIĤAJLOV. Kompletigo de la Esperanto-leksiko	11, 12
R. BANĤEVSKI. Internacia junpionira E-tendaro	12
P. IVANOV. Du gravaj aranĝoj	13
Enlanda movado	14, 15
Tra la E-mondo	16
Deziras korespondi	III
Tra la gazetaro	III
D. SIMEONOV. Suproj de la bulgara sporto	IV

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO

Ĵurnalo „Oteĉestven Front“ (20. VII. 1984) per ŝufice ampleksa materialo de Temenuĵka Stojanova informas pri la antaŭstaranta dua sesio de Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU) en u. Veliko Târnovo. Pri la solena malfermo de tiu ĉi Universitato informis Ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ (24. VII. 1984). Ĵ. „Veĉerni Novini“ (9. VII. 1984) donis lokon al granda informa materialo de Diana Ilieva sub titolo „Muzikaj festoj de la esperantistoj“ — pri la gastado de la Sofia E-Horo en u. Bydgoszcz, Pollando, kaj pri la antaŭstaranta festivalo de diverslandaj E-horoj en aŭgusto k.j., en Bulgario. Ĵ. „Transportna Iskra“, eldono de Urba Trafikdirekcio — Sofio (3. IV. 1984) aperigis artikolon pri disvastigo de la Internacia Lingvo inter la ĉefurbaj trafiklaboristoj en la pasinto kaj nun.

EN LA PROVINCO

Ĵ. „Borba“ — u. V. Târnovo (14. VII. 1984) informis per kontribuaĵo de Georgi Kirov pri la okazinta dua sesio de ISEU en u. Veliko Târnovo. La sama ĵurnalo (24. VII. 1984) informis pri la solena malfermo de la Universitato. En la monata memstara suplemento „Posoki“ de la sama ĵurnalo (14. VII. 1984) aperis artikolo de Olga Cankova pri Go-ludo kaj ĝia disvastigo pere de Esperanto. Ĵ. „Oteĉestven Glas“ — u. Vraca (17. VII. 1984) aperigis longan artikolon „Tri jaroj antaŭ la jubileo“ de Bojĉo Mladenov pri la antaŭstaranta 100-jara jubileo de la Internacia Lingvo.

Sur la kovrilpaĝo: La legenda partizano Aleksandăr Piponkov — Ĉapaj.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta Komitato: Marin BAĤEV, Vasil BOROVSANSKI,

Radoslav DOJĤINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr

HAĤIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario


tel. 31-70-19

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata preseo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

SUPROJ DE LA BULGARA SPORTO



La nuna venko de nia samlandanino Ljudmila Andonova kunigas en si la perfektecon de la fizikaj eblecoj, la forton de la homa spirito kaj la atingajojn de la sportscienco.

La ŝatantoj de la malpeza atletiko kaj la adorantoj de Ljudmila atendas de ŝi novajn rekordojn.

MANUELA MALEEVA — ĈU FENOMENO?

Jam multfoje la amaskomunikiloj en la mondo kaj precipe la sporta gazetaro notis la brilajn sukcesojn de la 17-jara bulgarino Manuela Maleeva en mondskalaj tenis-konkuroj. Si vere mirigis la specialiston per siaj talento, fizika persisto, sporta perfekteco. . . Manuela sin prezentis bonege en famaj mondkonkuroj de teniso en Francio, Italio, Anglio, Aŭstralio, Brazilo. . .

Ĉu sporta fenomeno?

La specialistoj asertas, ke Manuela simple estas „transfluginta“ iujn el la devigaj etapoj en la perfektigo de la sportisto-tenisisto. Jam 17-jara ŝi venkis (kun malgrandaj esceptoj) preskaŭ ĉiujn unuarangajn tenisistinojn en la mondo. Ŝia „duelo“ kun la usonanino Chriss Evert en Perrugia (Italio) denove pruvis ŝian perfektan teknikon, kvankam Manuela perdis la matĉon.

Nun Manuela Maleeva kaj ŝia malpli granda fratino Katerina estas en la unuaj vicoj de sportistoj, kiuj famigas nian socialisman landon, la bulgaran sporton.

D. SIMEONOV

REKORDA SALTO

Sian rekordan altosalton la specialistoj nomis „fantasta atingo de la revoj“. Enkadre de la Internacia malpezatletika turniro en la Germana Demokratia Respubliko, titolita „Olimpika Tago“, la bulgara sportistino Ljudmila Andonova ege alte saltis kaj plibonigis mondrekordon. 207 cm — tio estas la plej bona atingo en la historio de la virina malpeza atletiko. . . Tiamaniere Ljudmila Andonova superis la rekordojn de Ulricke Mainfahrt (FRG) — 203 cm, (1983), kaj de Tamara Biko-va (USSR) — 205 cm (1984).

Ljudmila Andonova estas naskita en 1960. Ŝi kreskas kaj lernas en Stara Zagora, montras viglan intereson pri sporto. Tiutempe ŝi estiĝas respublika ĉampionino de adoleskantoj. L. Andonova finas la Superan Instituton pri Fizika Kulturo en Sofio.

En 1931 ŝi atingas la mondrekordon de sia samlandanino Jordanka Blagoeva en altosalto — 194 cm, kaj la saman jaron ŝi superas ĝin, atinginte 195 cm.

